TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 57, Numero 01, Januaro 2021*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lušnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Memrigardo

*Maria COLUBRIALE, membro de EFNSK*

Ĉi tiu artikolo estas rigardo de Telopeo mem, «memrigardo», kiu detalas la argumentojn por plivasta gazeto. Oni ofte nomas Telopeon novaĵleteron, tamen eble ni devus konsideri Telopeon pli kiel gazeton. Letero estas skribaĵo, kiun oni sendas al alia persono por sciigi aferojn per poŝto (aŭ retpoŝto).[1] Gazeto estas eldonaĵo, publikigaĵo, presaĵo aŭ periodaĵo pri diversaj temoj, aktualaĵoj, novaĵoj.[2] Multe da gazetoj nomas sin mem per aliaj vortoj; folioj, informilo, cirkulero, revuo, ĵurnalo, magazino. Sed «gazeto» verŝajne pli taŭgas. Ekzistas multe da esperantaj gazetoj; ekzemple «La Esperantisto» je 1889 ĝis 1895, kaj «Monato» estas ege vasta gazeto.[3]

Mi ĝuas verki artikolojn, mi rigardas la procezon kiel eseojn, kaj estas bona praktikado, kaj la verkado kaj la legado. Tamen nur membroj de EFNSK ricevas Telopeon. La federacio nun rigardas Telopeon kiel rekompencon aŭ «premion» por membriĝo. Dum la lasta estrara kunveno mi lernis, ke bedaŭrinde nun EFNSK nur havas proksimume 30 membrojn, kaj verŝajne multe da homoj, kiuj ricevas Telopeon, ne legas ĝin. Mi parolis kun iu dum la Zamenhofa Festo, kiu ne legis la lastan numeron. Post la festo, mi ankaŭ parolis kun sidnejano, kiu ne ricevas Telopeon kaj ne eĉ sciis pri la okazaĵo. Ni povas uzi Telopeon pli utile.

Certe ne estas taŭga, ke homoj elspezas sian tempon por verki artikolojn, se ne multe da homoj legas ilin. Se mi mencias Telopeon, oni ofte demandas al mi, «kie oni trovas la artikolojn?» Eble ni maltrafis eblecon por reklami Esperanton. La solvojn ĉi tiu artikolo proponas:

1. **Permesu al nemembroj ricevi artikolojn!**
Tiel ne nur por membroj, kaj ne nur por novsudkimrianoj. Anstataŭ oni rigardas Telopeon kiel reklamon por la federacio, rigardu kiel ilon por reklami Esperanton mem. Certe ju pli da esperantaj verkoj des pli bone. Esperantaj verkoj estas gravaj, kaj ĉi tiu gazeto estus unu el niaj kontribuoj al la Esperanta movado.
2. **Disponigu Telopeon per la reto!** Ni jam havas retadreson esperantohouse.org.au.[4] Kaj se homoj tra la mondo povas legi la gazeton, la federacio pli grande kontribuus al la pli vasta diskurso en la movado. Io por la arkivoj.
3. **Eldonu la numerojn pli akurate!**
Ekzemple nova numero ĉiumonate je la unua sabato, kaj ĉiuj artikoloj devus pretiĝi je la lasta sabato (se ni havas sufiĉe da artikoloj). Ŝajnas, ke Telopeo dum la lastaj kelkaj monatoj eldoniĝis je hazardaj tagoj.

**Citaĵoj**

[1] Letero PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#letero_kd
[2] Gazeto PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020), https://vortaro.net/#gazeto_kd
[3] Monato Internacia Esperanta Gazeto. https://www.monato.be/
[4] Esperanto House Esperanta Domo. https://esperantohouse.org.au/

## Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Somerkursaro kaj Kongreso de Esperanto 2021

*Jonathan Cooper, direktoro de EFNSK*

De la 9-a ĝis la 13-a de januaro, esperantistoj de Aŭstralio, Nov-Zelando kaj ĉirkaŭ la mondo partoprenis en virtuala somerkursaro kaj kongreso. Ĉirkaŭ 250 homoj partoprenis, tamen ne ĉiuj samtempe.

Malgraŭ kelkaj teknikaj malfacilaĵoj je la komenco, ĉiuj baldaŭ alkutimiĝis al la novaj rimedoj. Ni aŭstralianoj miris pri tiuj eksterlandanoj (aparte de Eŭropo kaj Ameriko), kiuj vekiĝis je netaŭgaj horoj por esti "kun ni".


Mia sperto estis neordinara, ĉar mi respondecis pri unu el la tri virtualaj ĉambroj (tiu de la kurso de Trevor), pri registrado, kaj pri kunregado (kun Sandor) de la prelegaj sesioj (ĉefe por silentigi bruojn per malŝalto de la mikrofonoj de neparolantoj). Do, mi devis "ĉeesti" ĉiun sesion, tamen ne ĉiam povis bone atenti la prelegojn. Mi mem faris tri prelegojn – pri la arto prelegi, koloroj kaj filozofio – sed mi tiom zorgis pri ili, ke mi forgesis registri tiun pri filozofio (Do, mi devis reregistri ĝin poste.) Por mi, la kongreso estis laciga sed ne teda. (Nu, nur *kelkfoje* teda!)

Malgraŭ la evidentaj avantaĝoj de virtuala kongreso, kompare al ĉeesta (pli oportuna, malpli kosta, pli bona por la medio, ktp), la granda malavantaĝo estas la manko de vera kolega etoso. En ĉeesta kongreso, oni loĝas en Esperantujo dum tiuj tagoj, sed en la virtuala kongreso, homoj daŭre venas kaj foriras. Specife por mi, estis sperto ripete veni en Esperantujon dum du horoj kaj poste reiri al la "reala mondo" – ĉefe ĉar mia edzino ne estas esperantisto. Kaj mankis al ni la kutima grupfoto-sesio de Kam Lee!

Inter la sesioj, kiujn mi plej ŝatis, estis:

- La kosma programo, Artemiso, de Carlos Spinola
- Efika diskonigado kaj instruado de Esperanto en la reto, de Adonis Saliba
- Cikadoj: La sono de somero en mia ĝardeno, de Terry Manley
- Kuiri kun Helen [Palmer]
- Demandoj kaj respondoj de Humphrey Tonkin
- Videoludoj kaj la traduko, prelego kaj laborsesio gvidita de Mara Molnja kaj Cam Burton
- Montru kaj rakontu

Ĉiujn sesiojn (krom la tri kursoj, la kvizo kaj la adiaŭa diskuto) oni povas nun spekti en YouTube.
La plena listo troviĝas en la retejo de AEA, sub "Novaĵoj", aŭ:
[aea.esperanto.org.au/eo/kongreso-2021-youtube](aea.esperanto.org.au/eo/kongreso-2021-youtube)




*Tago 5 de la kurso por komencantoj – foto de la instruisto, J Marc Schmidt*

## Minimumismo

*Doris Chen, membro de EFNSK*

Minimumismo estas maniero forigi neesencon por atenti al tio, kio vere gravas, kio donas pozitivan signifon al niaj vivoj, kio donas al ni ĝojon kaj valoron. Minimumistoj serĉas feliĉon ne per aferoj, sed per vivo mem; tiel, dependas de vi, kio estas necesa kaj kio estas malnecesa en via vivo.

Mi eksciis pri la koncepto de minimumismo per la afiŝo de iu konatulo. Ŝi diris, ke ŝi havas nur utilajn aĵojn en sia loĝejo anstataŭ havi multajn aĵojn. En sia afiŝo, ŝi rekomendis libron pri minimumismo, kiu ŝanĝis ŝian vivmanieron.

La kialo, ke mi profunde interesiĝas pri ĉi tiu koncepto, estas, ke mi spertis translokiĝon. Tiutempe mi vere esperis, ke mi eble translokiĝus pli facile, se mi havus malpli da aĵoj.

Poste mi komencis kontroli la koncepton interrete. Ju pli mi komprenis, des pli interesita mi sentis min. Mi ankoraŭ lernas ĝin, eble mi diskutos pli venontan monaton.

## Ekspliko de l' Okazo "Wall Street Bets"

*Adam Levy, direktoro de EFNSK*

Ĉi semajne, vidis la mondo okazon tre interesan, kiu okazis rete ĉe l' retejo "Reddit". Multaj retuzantoj aĉetis multajn akciojn, riĉiĝis kaj plimalriĉigis riĉajn Murstratajn Kapitalistojn. La redditistoj venkis la investantojn je ilia propra ludo. Por kiu ajn, kiu ne jam scias, Reddit estas reta forumaro en kiu homoj povas aligi diversajn "Subredditojn" – forumojn plenajn je samideanoj. Unu el tiuj subredditoj estas "Wall Street Bets", aŭ "Murstrataj Vetoj". En tiu subreddito, homoj parolas pri siaj spertoj kun la borso kaj donas konsilojn unu al la aliaj.

En Usono, ekzistas ĉeno de butikoj "GameStop", kiel nia EB Games ĉi tie en Aŭstralio. Pro la pandemia ekonomio, kaj pro la fakto ke plej multaj homoj nun aĉetas siajn videoludojn rete, kaj ne en fizikaj butikoj, homoj atendis ke ĉi tiu firmao perdos multe da mono.

Do, kial tiuj faktoj gravas, vi dimandas al mi? Kaj kio estas la interrilato unu al la alia? Atendu, kaj kune ni esploros la mirindaĉan mondon de l' borsoj kapitalistaj.

Kiam investantoj kredas ke la valoro de akcio altiĝos en l' estonteco, ili evidente aĉetas tiun ĉi akcion je la borso, kaj vendas ĝin poste por havi pli da mono. Angle, tio nomiĝas "long position", aŭ "longa pozicio". Evidente, la mala afero estus la "mallonga pozicio", aŭ angle "short position". En tiuj okazoj, oni vetus kontraŭ la estonta plia valoro de la akcio.

Kiel oni faras ĉi tion? Tiel ĉi. Ni diru ke mi estas borsisto kaj ci volas mallongumi borsojn – en nia ekzemplo, GameStop-ajn borsojn. Kiel borsisto, mi posedas $100 da akcioj de l' firmao. Mi pensas ke tiu firmao baldaŭ malfortiĝos kaj la valoro de ĝiaj akcioj malgrandiĝos. Ci diras al mi: "pruntedonu al mi ciajn akciojn, kaj mi redonos ilin al ci post monato". Tiu monato estas la findato de la mallongumo. Mi mem pensas "kial ne, mi ne uzas tiujn akciojn nun do tiu stranga homo povas uzi ilin!"

Do, nun ci havas ciajn akciojn kaj povas ci vendi ilin je la borso. Tion ĉi ci faras, kaj gajnas sian valoron de cent dolaroj! Bona interkonsento, laŭ ci. Ci pravis, kaj post monato la valoro de la akcio estas nun $50. Simple aĉetu la malbonan, malmultekostan akcion el la borso kaj redonu ĝin al mi. Mi nun havas la saman kvanton da akcioj, kiujn mi donis al ci antaŭ unu monato, sed la valoro estas malpli alta. Ci gajnis $50, vendinte la multekostan akcion kaj poste aĉetinte ĝin pli malmultekoste. Gratulojn, ci ĵus faris cian unuan mallongumon! Ci estas vera Murstrata investanto nun.
Normale, tio ĉi funkcias bone por la investantoj, ĉar ili simple aĉetas la malmultekostajn akciojn kiujn neniu volas! Tamen, se ci malpravis, kaj la valoro de la akcio plialtiĝis dum la monato, ci devos aĉeti ĝin el la borso ĉiuokaze por redoni ĝin al ĝia posedanto, la borsisto. Je tiu okazo, ci malgajnus la malsamecon de la valoro inter la venda valoro kaj la aĉeta valoro.

Sed – kio okazus se tiuj akcioj subite malaperus? La investantoj ne povus aĉeti la akciojn kiujn ili pruntis el siaj borsistoj, kaj la borsistoj ne feliĉus tiel.

Ĝuste tio okazis ĉi semajne je Reddit. La uzanto "Deepfuckingvalue" vidis ke investantoj de Murstrato mallongumis la valoron de GameStop, aŭ vetis kontraŭ GameStop. Fakte, ili estis tiel memfidaj ke ili mallongumis pli da akcioj ol vere ekzistas en la borso. Do, li aĉetis akciojn kaj komencis afiŝi sian akciprofilon je la subreddito "Murstrataj Vetoj". Malrapide, la valoro de la akcioj plialtiĝis kaj li aĉetis pli kaj pli. Li daŭre afiŝis. Pli da redditistoj ekaĉetis akciojn de GameStop dum ĝi kreskis. Dume, la mallonguminvestantoj ekdevis reaĉeti la akciojn el la borso antaŭ la findatoj de siaj pozicioj. Sed, la provizo de akcioj ne estis tie. La redditistoj aĉetis ilin, kaj, ĉiu scias tion kio okazas kiam provizo malkreskas: valoro kreskas! La akcioj, kiuj en Oktobro 2020 valoris po malpli ol US$10 atingis la valoron de preskaŭ $500.

La apo "Robinhood", kie la redditantoj aĉetis la akciojn hodiaŭ eklimigis homojn aĉetantajn akciojn de GameStop. Tio  malkreskigas la valoron de GameStop ĉar la redditantoj ne plu povas aĉeti akciojn. Dum la horo en kiu mi skribas ĉi tiun artikolon, la valoro de la akcio falis al $214, kie ĝi estas nun. Ĉi tiu rakonto ŝanĝiĝas tre rapide, sed mi devas publikigi ĝin baldaŭ!

Kial limigis Robinhood la aĉetintojn, la aĉetantojn kaj la aĉetontojn? Simple. Robinhood vendas datumojn al granda kapitalfirmao "Citadel". Ili posedas grandan investon ($2.75 miliardojn) en la firmao "Melvin Capital", kiu perdis 30% de sia valoro. Citadel volas ke Robinhood kaj Melvin sukcesu. Nun, la apo limiĝis, kaj la valoro de GameStop malkreskas, la mallongaj pozicioj de Melvin ŝajnas sekuraj... Ĉi tiu estas enulkomercado per Citadel, RH kaj Melvin, kaj ĉi tiu estas kontraŭleĝa. Usonaj politikistoj el la du partioj inkluzive Aleksandrio Okazio-Kortez, Raŝida Tlaib kaj Ted Cruz kaj ankaŭ Donald Trump lpj, la filo de la usona prezidinto jam parolis kontraŭ la firmaoj.

Ni kune vidu kien iros ĉi tiu interesa rakonto en la estonteco.

## Ĉirkaŭ la mondo kun Esperanto.

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

En la komenco de januaro 2021 mia E-amiko el Istanbulo (Turkio) Fatma invitis min prelegi dum retkunveno de turka Esperanto klubo. Mi volonte konsentis kaj demandis pri la temo. Fatma proponis ke mi prelegu pri mia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo en la mezo de la jaro 2019. Mi decidis prepari prelegon nur pri la esperanta parto de mia vojaĝo. Dum la preparado mi rememoris kelkajn amuzajn renkontiĝojn kaj deziras diskonigi miajn memorojn al vi.

### Parto 1. Singapuro






Sendube Singapuro estas belega kaj tre interesa urbo/ŝtato. Mi rekomendas eksplori ĝin kun lokaj Esperantistoj: Frank kaj Wilson. Mi renkontis ilin tri foje dum 8 jaroj kaj ĉiam havis bonegan tempon.
Ekzistas grupo en Whatsapp: Esperanto en Singapuro.
Kontaktu ilin per ĝi se vi planas viziti Singapuron.



*Frank Stephan*



*Wilson Foo*



*Wilson Foo, mi kaj edzino de Wilson*

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00 (post la epidemio)
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Jonathan Cooper |
| Estrarano: | Alan Turvey, Adam Levy |

